

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli Nort, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 186
6. 4. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0.06 dolaro
aŭ 0.20 sv. fk. por landoj, kies valuto
suficis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0.05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrata-centimetra egalvaloro de
0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Kial la sonorilaro de Mechelen-Malines estas senkompara mirindaĵo?

Unue tial, ĉar la turo de la preĝejo Sankta Rombaut kun siaj grandegaj dimensioj pli taŭgis ol iu alia por la lokigo de potenca sonorilaro; tial ke la ses bazoj troviĝas je alteco de 55 m en granda ŝtona ĉambro kun obturiloj ŝtopitaj per voĉresendiloj (la sonorilega voĉo forte kaj modere akompanas la kanton de l' superaj oktavo); fine tial ĉar la 39 altaj sonoriloj estas kunigitaj je alteco de 75 ĝis 80 m en regulaj vicoj en la mezo de l' ĉambro 12×12×15 m) kie la harmonikoj kaj sonoj kunmiksiĝas kaj plifortiĝas antaŭ ol libere disvastiĝi tra la altaj kaj larĝaj malfermitaj aperturoj.

Due tial ĉar la sonorilaro, kies sonorilego „Salvator“ pezas 8884 kg, konsistas el amaso de bronzo pezanta 56000 kg; eĉ la plej malgrandaj sonoriloj enhavas sufiĉe grandan volumenon por aŭdigi sian voĉon proporcie je tiu de la mezaj sonoriloj kaj ĉar ĉiuj sone konkurantaj sonoriloj (28 sonoriloj datumantaj de 1674) estas la verko de la majstro-muldisto Petro Hemony el Amsterdam) estas akorditaj unu kun la alia (maloftaĵo en la grandaj kaj malgrandaj sonorilaroj) kaj faras tre harmonian akordon.

Trie ĉar la klavaro kaj ĝiaj kunigoj kun la sonoriloj estis konstruitaj fidel, ke ili absolute estras la plej malfortajn, la plej fortajn kaj la plej rapidajn movojn de la frapiloj, kaj ĉar la mekanismo estas ĉiam en tre bona stato.

Kvare ĉar sinjoro Jef Denyn ludas per sonorilaro kun senkompara virtuzeco kaj tre certa artistia gusto nur ludante muzikon kiu taŭgas por lia granda turinstrumento.

Axel Baesens, Mechelen-Malines.

Socia Vivo.

Estonujo.

Pilongigo de l' laborhoroj en ŝtataj institucioj.

En mezo de januaro la registaro decidis pilongigi la labortempon de l' ŝtatoŝtatoj. La nova laborarango principe enkondukita jam de la 1. 1. kaj fakte leĝigita la 1. 2. okupigos la oficistaron de la 8¹/₂ matene ĝis la 6 vespere, do 8 horojn (de la 1¹/₂ ĝis la 5-a) tutajn 9 horojn.

La registaro, sin bazante sur la en Eŭropo faritaj provoj, pravigis sian decidon per rezultanta ĝenerala pliiintensigo de l' laboro; tamen, antaŭvidante la certan malkontentigon de l' laboruloj, ĝi penis dolĉigi la novjaran amaran pilolon, kredigante ke la reformo antaŭ ĉio utilos la oficistojn mem; pliiintensigo de l' laboro permesos maldungi superfluaĵojn oficistojn, do rezultigos ŝparadojn, utiligotajn por plibonigo de materiala stato de la aliaj. Fine, la nova arango, oni diris, koncernas fakte nur 7800 oficistojn, ĉar poŝtaj kaj fervojaj oficistoj, policanoj k. a. kategorioj de ŝtatoŝtatoj estas jam okupitaj 8 horojn.

La decido de l' registaro elvokis akrajn protestojn de diversfakaj kaj diversrangaj oficistoj. La profesia unuigo prezentis al la registaro protestojn kaj kunvokis en la salonego de l' koncertejo „Estonia“ multevizititan kunvenon rezolucion kontraŭ la registara decido. Precipaj kontraŭdiroj estis: plialtigo de la salajroj kaj la tagmanga paŭzo, neaplikemia kaj nesufiĉa por multaj malproksime loĝantaj oficistoj kaj elspeziga pro multekosteco de privataj manĝejoj. Plie oni notis, ke la paŭzo malebligas al multaj vizitadon de diversaj kursoj, ordinare komenciĝantaj je la 5-a h. vespere.

Kvankam la registaro, konsiderante la ofendojn kiel homojn jam plinfinintajn sian klerigadon, ignoris la lastan argumenton, tamen la unanima protesto kaj la morala subteno, esprimita al la estonaj ŝtatoŝtatoj de la latvaj, efikis la registaron: ĝi cedis kaj elvenigis la cirkuleron,



Bildo de la fama sonorilaro de Mechelen-Malines, Belgujo.

enkondukantan la 7-horan laboragordon kun 1/2-hora paŭzo, kiun la apartaj institucioj, ev. kancelarioj, rajtas laŭbezone malapliki.

Ankaŭ en najbara Latvio la registaro alprenis similan decidon pri plilongigo de l' laborotempo kaj malplimultigo de l' oficistaro. Kiel raportas fiaj gazetoj, la ŝtatoŝtatoj kunvenigis kunvenon de siaj delegitoj, kiuj konsideris la registaran projekton kiel nedeziratan kaj ĉiaokaze kunligitan kun plialtigo de l' salajroj kaj esprimis la deziron, ke la eventuala maldungo estu aplikata unue al la bonhavaj oficistoj. La kunveno rezolucis esprimi „moralan subtenon“ al la kontraŭ plilongigo de l' laborotempo luktantaj estonaj kolegoj kaj sendi al ili kuraĝigan telegramon.

Laŭ postaj sciigoj el Riga la ministraro, parte cedante al la postuloj de l' oficistoj, decidis enkonduki la 7-horan laboragordon kaj nome de la 1. 4. Kiel rekompencan la ŝtatoŝtatoj ricevos nunjare 13-monatan salajron. R. L-son, Tallinn.

La enketo pri produktado.

La dua volumo de la raporto pri la enketo pri produktado, enketo farita de la Internacia Labora Oficejo, aperis antaŭ ne longe. Tiu ĉi volumo koncernas la parton de la enketo rilatan al la ĝenerala movado de produktado depost la antaŭmilita epoko ĝis 1921 aŭ 1922 kaj la responda movado de la media produkto laŭ laboranto. La du sekvantaj volumoj koncernos la kaŭzojn de la krizo kaj la proponitajn rimedojn kaj faritajn eksperimentojn.

La dua volumo enhavas 1356 paĝojn, kune kun 665 tabeloj kaj 350 diagramoj. Preskaŭ mil paĝoj necesiĝas por la ekzameno de la ĝenerala movado. Tiu ekzameno ampleksas plurajn artikolojn klasifikitajn sub la jenaj rubrikoj: mineraloj, brutaj, minaj kaj metaloj, kemiaj produktadoj, agrikulturaj produktadoj destinitaj al industrio, agrikulturaj produktadoj destinitaj al nutro, agrikulturoj, manufakturoj industrioj, konstruado.

La komparoj faritaj estas bazitaj sur statistikaj donitaĵoj rilataj al la diversaj landoj, donitaĵoj eldonitaj en la raporto. La metodo sekvis por tiuj komparoj estas la jena: oni indikas unue la ĝeneralan movadon de produkto dum la tuta periodo pritraktata kaj poste sekvas la movado en ĉiu el la jenaj kvar grupoj da landoj: militintaj landoj en Centra kaj Orienta Eŭropo; militintaj landoj en Okcidenta Eŭropo; neŭtralaj eŭropaj landoj; ekstereŭropaj landoj. Fine oni klopodas indiki la ŝanĝojn okazintajn en ĉiu lando.

La objektoj konsideritaj ampleksas la jenajn: karbono, oleo, fero, kupro, plumbino, zinko, aluminio, hidrargo, arĝento, oro, sterkoj, sulfuro, kaŭĉuko, kotono, lano, silko, tolo, kanabo, juto, beto, kan-sukero, sukero, tritiko, sekalo, maizo, rizo kaj ŝipoj.

La parto de la libro pritraktanta produkton laŭ laboranto dividiĝas en tri sekcioj, kiuj respektive koncernas: problemojn pri metodo; produkton laŭ laboranto en diversaj landoj; aldonan informojn pri produkto en agrikulturo.

Informservo de la Internacia Labora Oficejo.

Scienco.

Rimarkinda Fizika Laboro.

Fiziko instruas ke la absoluta nulpunkto de la temperaturo estas — 273° C. Tia povas esti la temperaturo de la kosma spaco. Tiu ĉi absoluta nulpunkto ankoraŭ ne estas produktita en laboratorio. Prof. Onnes kun 70 asistantoj laboras en speciala instituto ĉe la fama Universitato en Leyden (Leyden'a botelo en la elektrostato) por tiu celo. Konsiderante ke — 20° C estas jam tre malvarma vintra temperaturo, ni havas nenium imageton pri la detrua forto de tiu ĉi absoluta nulo. Efektive neniu vivo aŭ movo ekzistas tie. Se ni sukcesus atingi ĝin, multe da malhelaj punktoj de la nun reganta teorio povus esti klarigitaj, multe da interesaj fenomenoj povus esti observataj. Mankas ankoraŭ sole 1/5° por atingi nulon, sed ĵus tiu ĉi eta diferenco ŝajnas nevenkebla. Ĉe tiu ĉi temperaturo la elektra fluo ĉesas en la konduktilo! Jen unu el la plej ekzaktaj sciencaj laboroj. M.

Internacia Universitato en Bruxelles.

En Bruxelles (Belgujo) estas malfermita universitato, alirebla por anoj de ĉiuj nacioj. La prelegoj estos en lingvo franca. Fondinto de la universitato estas industriisto s-o Herman el Detroit en Ameriko. — Eble kompetentuloj-mondlingvanoj povus atingi, ke oni por la prelegoj akceptu ĉe internacia universitato ankaŭ vere internacian lingvon. Pola Esp. Servo, Bydgoszcz.

Tekniko.

Senfadena lumigado.

Laŭ la gazetaro en la esploroj de la General Electric Company en Schenectady en ŝtato New York, oni ardigis antaŭ nelonge ordinaran 110-voltan lampojn, tenatan antaŭ vaku-tubo je distanco de ĉirkaŭ 50 cm, tra kiu oni kondukis alternofluon de 2 milionoj da turniĝoj. Oni ne havis ian metalan interligon inter lampo kaj energifonto. L. F.

Parolanta filmo.

La unuan prezentadon de parolanta filmo por okcidenta Germanlando oni havis antaŭ nelonge en Münster i. W. Laŭ la raportoj ĝi estis grandioza sukceso, kaj la ofta laŭta aplaŭdo egiĝis fine ĝis ovacio al la ĉeestanta kunspensinto Josef Massolle, germano naskita en Bielefeld.

Leono Funken, Koblenz.

Progreso en la vaporkaldron-konstruado.

Al tiuj progresoj apartenas antaŭ ĉio la jam ĝenerala aplikado de trohejtitaj vaporo. Tamen la trohejtitaj vaporo sentigas ankaŭ siajn malutilojn. Konstruado de trohejtitaj supozigas tre lertan arangan kaj pli precizan kalkuladon ol tio ĝis nun okazis. Precipe la modeligo de armaturoj kaj tubkunigaj elementoj apartenas al tiuj delikataj taskoj, ĉe kiuj oni eĉ hodiaŭ atendas plibonigojn. Ĵus tiuj lokoj influas nome profunde la efekton de la vapormaŝinoj. Kaj la konkuro inter la kaldronaj firmaoj laboras ĝis minimumaj diferencoj. Oni atentegas ja la atmosferan barometrostaton ĉe la eksperimenta komparado de efektoj!

Alia granda progreso estas inaŭgurita ĉe la ĉiam pli intensa plialtigo de uzina premo kaj efekto. Tensioj de 10-12 atmosferoj estas hodiaŭ ĉiutage ordinaraj, efektoj de brulmaterialo kaj hejtsurfaco ĉiam pliboniĝadas. Precipe evidente ni vidas tion ĉe flambokaldronoj.

Ĉe la konstruado oni devas hodiaŭ ekzakte atenti la fiurilatajn leĝojn kaj ordojn de ŝtato kaj de industria polico. Ili estas precipe severaj ĉe fumtubo kaj kaldronoj. Dank' al ili akcidentoj ĉe lokomotivoj kiel ankaŭ ĉe lokomobiloj okazas malpli. Hodiaŭ la anglaj instalaĵoj estas la plej sekuraj: antaŭ la milito la germanoj gvidis sur tiu ĉi teritorio. Tion montras la statistiko.

La rotacia movo venkas la malnovan krankomekanismon. Kruckapoj, piŝtoj, cilindroj, ekscentra ŝtango ktp. estas anstataŭigitaj per padeloj kaj aliaj maŝin-elementoj de la vaporturbino. Jen la vojo de la estonta progreso.

Jozefo Major, Budapeŝt.

Kulturo.

Instruo per korespondado en Svedujo.

La ideo pri instruo per korespondado estas en Svedujo 25-jara. La 1 dec. de l' pasinta jaro pasis 25 jaroj, post kiam la unua korespondada instituto „Hermod's Korrespondens-Institut“, fondita de direktoro H. S. Hermod, komencis instrui per korespondado.

La komenco de tiu ĉi instituto estis tre modesta, sed la ideo, „instruo per korespondado“, progresis kaj interesigis multajn studemajn personojn, tiel ke ĝi nun havas grandan disvastiĝon.

La unuaj fakoj, en kiu oni per tiu ĉi maniero instruis, estis: librotendado, kaligrafio, sveda ortografio, aritmetiko, germana kaj angla korespondado komercaj. La instituto poste rapide evoluigis kaj instruas nun en multaj fakoj. La instituto estas dividita en 10 partojn: la komerca parto; la lingva parto — kiu inter alie ampleksas kursojn en la germana, angla, franca kaj rusa lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto; la teknika parto; la reala gimnazia parto; la studenta parto; la mefiolerneja parto — kiu ampleksas preparajn kursojn por eniro en specialaj lernejoj; la jura parto; la terkultura parto; la parto de desegno kaj pentrado; la parto por psika kulturo.

Multaj personoj studis kaj studas ĉe suprenomita instituto, kaj pluraj jam sukcese ekzamenigis ĉe gimnazioj, poste eĉ fariĝis studentoj. La sumo da instruitaj personoj ĉe tiu ĉi instituto ĝis la nuna dato estas pli ol 210 000, kiu estas granda nombro rilate al la malmultaj loĝantoj (ĉirkaŭ 6 milionoj) en Svedujo. Ankaŭ atentiginde estas, ke grandnombro da tiuj ĉi 210 000 personoj tradusis pli ol unu kurson.

Krom „Hermod's Korrespondensinstitut“ — kiu tamen estas la plej eminenta — ekzistas pluraj institutoj por instruo per korespondado, kiuj uzas saman metodon, kiun direktoro Hermod enkondukis por instruo. La plej rimarkindaj el tiuj ĉi institutoj estas „Ousby“ kaj „Noréns“. Ankaŭ Kooperativa Asocio instruas per korespondado.

Kompreneble estas, ke direktoro Hermod, kiam li antaŭ 25 jaroj komencis disvastigi la novan sistemon: „instruo per korespondado“, renkontis multe da dubo, malkompreno kaj kontraŭstaro; kaj eĉ hodiaŭ oni iufoje povas renkonti dubanton aŭ konservativulon, kiu opinias, ke oni ne sukcese povas lerni per korespondada instruo. Sed — laŭ mia kredo — ne estas multaj homoj en Svedujo, kiuj nun oficiale kuraĝas neigi, ke la suprenomita sistemo estas kapabla por instruado.

La preparolita sistemo instrua tamen ne klopodas konkuri kun la buŝaj lernejoj. Ĝi nur volas plenumi bezonon, kiu efektive ekzistas, nome esti „lernejo“, kiu venas al la lernanto, anstataŭ, ke la lernanto venas al lernejo. Ĝuste pro tio, ke „lernejo“ per tiu ĉi sistemo venas al la lernanto, ĝi havas tiel grandan signifon por personoj, al

kiuj — depende de sia ofico aŭ alia kaŭzo — mankas tempo por viziti iun de la ordinariaj lernejoj por perfektigi. Ili povas studi dum libertempoj tiel rapide aŭ malrapide, kiel ili volas, ĉar studotempo por ĉiu temo estas nelimitita.

Sed speciale por la laborista klaso tiu ĉi instrua sistemo havas grandan signifon. Personoj el tiu ĉi klaso malofte — kaŭze de manko de tempo kaj mono — havas okazon viziti ian lernejon escepte de infana lernejo, kiun ili ja vizitis dum sia infaneco. Sed per tiu ĉi sistemo la laboristo povas fari sian laboron kaj studi dum la intertempo kaj tiel iom post iom plibonigi sian scion.

Multaj svedaj laboristoj ankaŭ uzas tiun ĉi studmanieron por havigi al si klerigadon.

Gunnar Danielsson, Vistinge, Svedujo.

„Infanhelpe“ kaj Esperanto.

La bone konata unuigo „Savu la infanojn“ eldonis en beleta 40 paĝa broŝureto laŭ formato de UEA-eldonaĵoj la **Deklaracion de Genève** konsistanta el kvin punktoj pri la infano, kiuj diras:

1. La infano devas havi la eblon kreski en normala maniero materiale kaj spirite.

2. La infano malsata devas esti nutrita, malsana infano devas esti flegata, malprograsa infano devas esti kuraĝigata, elvojigita infano devas esti elsavata, orfo kaj forlasito devas ricevi hejmon kaj helpon.

3. La infano devas esti la unua ricevonto de helpo en tempo de danĝero.

4. La infano devas havi la eblon gajni sian vivon kaj esti protektata kontraŭ ĉiu formo de ekspluatado.

5. La infano devas esti edukata al sindono de siaj plej bonaj kvalitoj tro la servo de siaj fratoj.

Tiu teksto estas tradukita en 56 lingvoj (inter alie en araba, persa, turka, ĥina, japana, armena literoj) kaj ankaŭ en Esperanto. Prezo de la broŝureto 1 sv. fk., mendebla ĉe „Union Internationale de Secours aux Enfants“, 4 rue Massot, Genève. La neta profito estas por la bonfara entrepreno menciita. Skribu vian mendon en Esperanto!

Aktuala politiko.



Poincaré

Poincaré.

Unu el la politikistoj de internacia famo estas Raymond Poincaré. Li nun estas 64 jara. Li vivis en Paris kiel advokato kaj krome okupis sin pri ĵurnalismo. Lia reputacio kaŭzis la elekton de lia persono kiel kabinet-ĉefo de la

Agrikultura ministerio sub Develle en 1886. Unu jaron poste oni elektis lin kiel membron de la ĉambro de deputitoj. Nur 53 jara li jam fariĝis instrua ministro en la kabineto Dupuy. En ties dua kabineto li fariĝis financa ministro. Li ricevis la ministerion de instruo sub Ribot. Dum ĝis li estis prezidanto de la ĉambro kaj en 1903 fariĝis senatano. La ministro Sarrien konfidis al li en 1906 denove la financon ministerion. Li ekigis poste. En 1912 li prenis sur sin la transformadon de l' kabineto kaj fariĝis ministro de eksteraj aferoj. La 17. 1. 17. li fariĝis prezidanto de la franca respubliko, kiun postenon li havis ankaŭ dum la milito. Jam post la milito oni diris, ke li retirigis de la registaro, speciale pro nekonsento al la tendenco de Clemenceau. Post ne longe oni vidis lin denove en la Ripar-komisiono, ĝis 1922 li denove dediĉis sin al ĵurnalistaj laboroj. En januaro 1922 li formis la kabineton. La 26 marto 1924 li disigis sian kabineton. La prezidanto de la franca respubliko akceptis la abdikon, sed petis Poincaré preni sur sin la novformadon de l' kabineto. *R. Kr.*

Internacia sporto.

Aerveturado.

Ĉirkaŭ la mondo per aeroplano.

La antaŭ kelka tempo jam anoncita aeroplana veturado ĉirkaŭ la mondo ĵus komenciĝis en Santa Monica en Kalifornio (Usono). La veturadon efektiviĝas ĉirkaŭ 5 oficioj per forflugo de 4 aeroplanoj kun sama nombro da akompanantoj per flugmaŝinoj de la Douglas Airplane Company. La diversaj aeroplanoj estas ekipitaj ĉu por veturado super tero ĉu por veturado super akvo.

La aparatoj pasas de Seattle (Washington) laŭlonge de la bordo de Kanado kaj Suda Alasko trans la Aleuta insularo, trans la japanaj regionoj de la azia orientbordo, la bordo de Ĥinujo, poste laŭlonge de Franca Hindujo, Siamo kaj Birmo, tra Hindujo, tra la persa golfo norden, tra Turkujo kaj Eŭropo al Anglujo, de tie trans la Faraer-insularo al Islando, poste al Grenlando, laŭlonge de ties orienta bordo ĝis la Kabo Farvell. La reveturo okazas de tie al Labradoro, laŭlonge de la kanada bordo, poste sudokcidenten laŭ la rivero St. Lorence, de tie al Quebec, Montreal al Seattle.

La flugado daŭros kelkajn monatojn. Oni supozas, ke la aviadistoj alvenos en Eŭropo ĝis 1 julio.

La angla konkurenca flugado.

Angla trio de aviadistoj konkuros al la amerikana entrepreno. La aviadistoj Mac Lore, Plenderhill kaj Andrews ĵus forlasis Southampton. La veturado daŭros tri monatojn, kaj la aviadistoj pasos tra Francujo (Lyon), Italujo (Brindisi), Grekujo (Athenaj), Egiptujo (Cairo), Mezopotamio (Bagdad), Hindujo (Calcutta), Ĥinujo (Hongkong), Japanujo (Tokio), poste trans la Hinda Oceano al Southampton. * * *

Ni estos dankemaj al transmaraj samideanoj por resumaj raportoj kaj bildoj de eventuala alteriĝo. *Red.*

Subtenu la oficialajn instituciojn!
Kiu rapide donas, tiu donas duoble.

Frateco kaj paco de la mondo.

En la mondo nuntempa ni vidas ĉirkaŭ ni la disrompiĝon de multo, kion ni kutimas konsideri esenca por sociala stabileco, industria prospero kaj internacia respekto, kaj la sento de malkvieteco, de necerteco estas komuna al ĉiuj nacioj. Kontraŭe al ĉu de tiuj, forme pli-malpli difinitaj, aspekte pli-malpli minacantaj danĝeroj troviĝas la danĝeroj de revolucio, la hazardoj de konflikto: la spirito ĉie en la mondo ŝajnas esti spirito de detruo. Tiu detruo estas aktiva. Estas vane nei tion. La periodo de ĝia aktiveco komencis je milito, etendiĝis dum la jaroj sekvintaj la deklaracion de paco kaj montris necertan signon de malkresko. Tamen la fakto de detruo, la disigo, la deŝiro, kiuj malfortigas pro timo la korojn de multaj kaj nebuligas la mensojn de multaj pro antaŭseno, ne alportos superegan pezon nek por fitego nek por malkuraĝo. Ĉar la detruo estas nur rilate formojn, la formojn taŭgajn al la malnova ordo de aĵoj, kaj ilia rompo signifas, ke la malnova ordo ŝanĝos donante lokon al nova. Tio signifas, ke novaj formoj devas esti konstruataj, kiuj taŭgas al la jarcento estonta.

La procedo de la ŝanĝo estas procedo de doloro. En multaj landoj en la mondo nuntempe suferantaj estas abundeco pri tio: sufero pro manko de nutraĵo, pro protekto, pro la kutima necesajo de vivo, sufero de senhelpaj homaj

estajoj, parte elparolata, sufero de senhelpaj bestaj estajoj, tute ne elparolata aŭ, se iel esprimita, ne atentata. La tuta kreaĵo ĝemas kaj laboras kune en doloro, ne evitebla kune, ĉar ja ĉiu vivo estas unu, kaj unueco de vivo signifas komunecon de la malharmonioj kaj mizeroj kiel de la ĝojoj de la vivo.

Tio estas ja la supera fakto de la unueco de la vivo, kiu ligas la kaŭzojn de la nuna sufero kaj la esperon de la estonta felico. Sekve de tio, ke la kuitimo de la estinteco, la ŝtateco, la diplomatio, la socia kaj industria kondiĉoj estis konstruitaj nekonsiderante tiun fakton, la fakto estas nedisigeble ligita al tio, ke unu Fonto de vivo, komuna Patreco enhavas Fratecon, vasta kiel la vivo mem.

Ĉiam la nacioj ekzistis aparte; ĉiu opiniis sin mem aparta unuo, ne parto de sinteza tuto, kaj ĉiam la homaro konsideris sin mem flere diferenca de ĉiuj aliaj specoj de estajoj, ne ŝtupo de la granda ŝtuparo de kreaĵo. Sed kie la vero de Frateco estas ekkonata kaj akceptata, la malnova politiko de disigo kaj egoismo nepre foriĝos, kaj kun ili la sufero kaj ruinigo, kiujn ili kaŭzis.

Venis la tempo en la historio de la mondo por la akcepto de tiu ĉi vero de Frateco, Frateco de homaro, enhavanta ĉiujn naciojn kaj gentojn, Frateco etendiĝanta super homaro al subhomaro. La signifplena forto de ĉi tiu vero iĝas detrua, se kontraŭstarata aŭ miskomprenata, sed ĝia esenco estas konstruanta, ĝia funkcio estas kom-

pensanta, ĝia akcepto gvidas al libereco. Hodiaŭ ni estas blindumitaj. Ĉiu nacio, vindita en la vindotukoj de malnovaj ideoj, tradiciaj politikoj, heredaj suspektoj, ne kuraĝas eniri la heredon de paco, prospero, libereco, iimante aliajn naciojn, supozante, ke la resaniĝo de alia popolo signifas vundi sin mem, ne povas vidi la vastan arbaron de homaro pro la arboj de sia propra egoismo. Sed vindotukoj, kiam ili estas tro longatempaj uzataj, iĝas morivestoj. Homaro, nun atinganta virecon, devas eviti infanajn aĵojn, devas forĵeti tiujn eraraĵojn de malmaturaj pensoj, ke nacioj kaj individuoj povas vivi inter si mem. Komercio, ekonomio, financo, industrio postulas por sia sukceso kunlaboradon, kaj ju pli vasta estas la kunlaborado, des pli solida estas la sukceso. Egoisma pedanteco povas flori dum kelka tempo per la malprospero de siaj kunuloj, sed evoluo atingis la punkton, kie la akcepto kaj praktiko de Frateco estas esencaj, ne nur por progreso, sed por postvivo. La nacioj, kiuj sin detenas de tio, estos kondamnataj al la sorto de l' blindaj kaj obstinaj nacioj de la estinteco.

Sed la alveno de Frateco, vidante ke la malnova ordo estas ankoraŭ fortika, ke ĝi estas subtenata de la antaŭjuĝo de hieraŭ kaj la tendenco de hodiaŭ, ne okazos sen malkvieto.

La nova vino de tio, verŝiĝanta en la mondon, estas forta rikolto. Ĉu estas mirige, ke ĝi rompas la mallunajn botelojn? Ĝi bezonas novajn botelojn, sufiĉe fortajn kaj sufiĉe plastikajn por kontraŭstari la grandan forton de ĝia fermentado.

Piedpilko.

La ĉeĥoslovakaj piedpilkaĵ kluboj ludis dum la jaro 1923 359 internaciajn vebatalojn. El tiu ĉi nombro 129 estis luditaj hejme kaj 210 en fremdlando. Hejme oni ludis 54 foje kun germanoj, 51 foje kun aŭstroj, 16 foje kun hungaroj, 4 foje kun jugoslavoj, 3 foje kun poloj kaj 1 foje kun danoj (polianoj). En fremdlando oni ludis 127 vebatalojn en Germanujo, 44 en Hispanujo, 10 en Aŭstrio, 7 en Turkujo, 8 en Italujo, 4 en Hungarujo, 3 en Jugoslavio, po 2 en Svisujo, Luksemburgo kaj Danujo.

Pacifismo.

Konkurso de la paco.

Riĉa nordamerika komercisto el Boston, s-o Edward Filene, starigis konkurson de paco en Francujo, Anglujo kaj Italujo pri jena temo: „Kiel restarigi la sekurecon kaj la prosperon en Francujo kaj Eŭropo per la internacia koopero?“ Estas 28 premioj je la sumo de 200000 fk., el kiuj la unua de 20000 fk. La franca komitato estas prezidata de s-o Léon Bourgeois, senatano kaj eksĉefministro, kaj enhavas diversajn eminentulojn. La adreso estas: „Concours Français de la Paix“, 286, Boulevard Saint Germain, Paris. Estas rekomendate al francaj, anglaj kaj italaj samideanoj, kiuj partoprenos en aliaj landoj al ĉi tiu konkurso, paroli pri la utilo de Esperanto.

L. Agourine, Paris.

Pacifistaj konferencoj en Rumanujo.

La 2 marto en la buĝareŝta palaco „Fondaĵo Karlo I“ okazis la unua propaganda kunvido de la „Nacia Asocio por Paco“, prezidata de s-o Emil Pangratti, universitata rektoro en Bukureŝti. Sinjoro rektoro akcentis en sia parolado la neceson de kolektiva eduko de popolo al popolo, por malebligi ĉiun agresivan agon. La patriotismo signifas: defendi la heredaĵon de l' prapatroj, sed ne ataki kaj aneksi. La homaro direktiĝas al idealoj altaj kaj ni esperas, ke la perforton de l' pugno baldaŭ ŝanĝos la regado de l' justeco kaj homa solidareco.

S-ino Ella Negruzzi diris, ke la paco estas la ĉefhelpanto de l' justeco, jen pro kio la feministoj batalas por triumfiĝi la ideon pri paco. Laŭ ŝia opinio la pacifista edukado de la gejunularo devas esti la komenca paŝo.

S-o D. Manoilescu parolis en la nomo de la kristanaj studentaj asocioj rumanaj. — Komuna agado de la tutmonda studentaro tre proksimiĝas la sopiritan harmonion intergentan. La interŝanĝado de ideoj, internaciaj kongresoj oftaj kreas animan komunicon destinitan plifaciligi la vojon al la paco.

Esp.-Centro Rumana.

Eŭropo.

Aŭstrio.

Grossarl (Salzburg). 15. 3. 24 oni fondis grupon kun la nomo „Verda Tauernstelo“ kiel subgrupon de Salzburg kun 16 gesamideanoj. Prez. Karlo Schnabl, instruisto, vicprez. pastro Niedermühlbacher, sekr., f-lino Stäuble, instr.

Ĉeĥoslovakio.

Dolné Kounice. Instruisto s-o Kilian ekinteresis la geinstruistojn por Esp. Jam de kelkaj semajnoj 9 geinstruistoj (kune kun la lernejestroj!) kaj 3 oficioj vizitas fervore lian kurson, en kiu li de la unua horo parolas nur esperante.

En Podmokly, Bolevice apud Deĉin kaj en Ĉesky Beŝov apud Podmokly estas fonditaj de s-o Emil Sala, fervojisto, Chrochovice, novaj grupoj de Ĉeĥosl. Labor. Soc. Esp.

Francujo.

Beauvais. La esp. grupo elektas kiel honorajn prez. s-on Noël, senatano, prez. de la Komerca Cambro, kaj la urbestron Degroux. Somera kurso estos starigata. — La kongreso de la Esp. Federacio de la Parisa regiono okazos en Arceuil la 1 junio.

Germanujo.

Dresden. En la monata kunveno, la 26. 3. parolis s-o Ivan H. Krestanoff pri „Popolkredo kaj kulturo en Bulgardo“. Dimanĉon, la 11 majo la loka unuigo aranĝos en la granda ĉambrego de „Verenishats“ printempan feston kun koncerto, teatro, prezentadoj de Esp.-lernej-klaso kaj balo. Samideanoj, kiuj dum tiu tempo estos en Dresden estas kore invitataj partopreni.

Krefeld. La 2 bunsukcesa esp. parolado en Kolpinghaus de s-ano instruisto Giessmann antaŭ multnombra aŭskultaro. Ĉirkaŭ 25 pers. enskribiĝis por esp. kurso, de s-o von Loeqinghien.

La 14. 2. ĝenerala kunveno de la L. G. La grupa vivo estis malhelpata dum la pasinta jaro per la sekvoj de la politika situacio. El kurso en junularo laborista fondiĝis aparta lab. grupo. Propagandaj artikoloj aperis en ĉi tia gazetar. Estraro estas: prez. s-o Max Rother, homercisto; vicprez: s-o Paul von Loeqinghien, kas. s-o Alex Stöcker, bibl. s-o Karl Giessmann; sekr. s-ino Klara Ems, Steinsir. 117. Kunveno: ĉiujade je 20 h. en urba meza knabinlernejo, Nordstr. 1, Ecke Ostwall.

Granda Britujo.

Torquay. En Kooperativa Halo de Torquay Kooperativa Gildo, la 24. 5. s-o W. R. Wood faris prelegon kun umbildoj pri „La Vivo de Zamenhof kaj la Frua Historio de Esp.“

Polujo.

Heszca. Fondiĝis grupo por la junularo „La juna Sardos“ sub gvidado de s-o Goldfeder. Prez. estas Haim Garbar.

Dubro. Ankaŭ ĉi tie estas fondita grupo.

Rusujo.

Aleksandria (Ekaterinoslava gub.) 28. 9. 25 fondiĝis esperanta rondeto ĉe klubo de profesiaj unuigoj. Gvidanto D-o Sibraevskij.

Barnaul (Altaja gub.) Esp. rondetoj nun ekzistas en ok vilaĝoj: Pavlovskoje Novikovo, Kamiŝenka, Korobejnĵkovojsiŝevo, Staraja Bara, Lebjajke kaj Sroslnsĵkoje.

Kasimov (Razana gub.) Esp. estas enkondukitaj kiel deviga objekto en du mezgradaj lernejoj (150 lernantoj). Gvidanto D-o K. Kozlanikov.

Leningrad (Petrograd). Esp. grupoj kaj kursoj estas organizitaj ĉe la fabriko de Zinovjev (18 pers.), Tosna fabriko (23 p.), Laborista klubo „K. Liebknecht“, Estona Laborista Fakultato (40 p.), I-a Politeknika Instituto (70 p.), Milit-politika Lernejo je la nomo de Engels (15 p.), Internacia Militista Lernejo (40 p.). Ĉiuj rondetoj kaj kursoj estas subtenataj de la cititaj institucioj.

Esp. kursoj havas bonan sukceson ĉe Leningrada Societo „Espero“, ĉe Fervojista Sekcio kaj ĉe blinduloj. Lastatempe organiziĝis esp. kursoj ĉe Kemia Farmaciista Instituto.

Minusinsk (Siberio). 3. 9. 25 Esp. rondeto estas fondita ĉe laborista klubo. 1. 10. 25 komenciĝis kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

Moskva. 14. 11. 25 en la aŭditorio de Politeknika Muzeo moskvaj esperantistoj organizis politikan kunvenon. Pri internacia politiko parolis k-doj Ambr (anglo), L. Revo (franco), Sotmari (hungaro). Dyzjen k. a.

25. 11. 25 en la presejo N. 33 k-doj Jodka kaj Javorenkov faris raportojn pri internacia lingvo. Ceesatis pli ol 100 pers. Estas organizita esp. grupo. En mura gazeto de la presejo aperis artikolo pri Esperanto.

25. 11. 25 okazis koncerto de moskvaj esp. per radio-telefono. Sciigoj pri ĝi estas ricevitaj el Taŝkent (Turkestano) Odessa, Barnaul (Siberio) kaj eksterlando.

En Komunista Universitato de orientaj popoloj estas organizitaj esp. kursoj por du grupoj. Aŭskultantoj estas pol. elmigrintoj: hinoj, koreanoj, grekoj, bulgaroj, turkoj k. a.

En Moskva Klubo estas organizitaj literatura kaj marksisista rondetoj.

Ĝi signifas, ke la spirito de militado mortu kaj krueleco estu forpelata; ĝi signifas, ke la heredo de Frateco anstataŭu la testamentojn de Kajno.

Frateco ne estas freneza fantazio, sed vojo de vivo, praktika kaj sana; vojo ne sur kiu oni serĉas mem, sed por la bono de ĉiuj; certa vojo al la paco de mondo. La homoj de ĉi tiu morianta jarcento rigardos tion kun malestimo, returniĝos de tio malkrede, rifuzos sekvi tion, sed la Nova Jarcento havos siajn infanojn, siajn virojn kaj virinojn, siajn knabojn kaj knabinojn kun okuloj, kiuj vidas, kaj oreloj, kiuj aŭdas, kaj koroj, kiuj povas kompreni. Al ili la vojo estas malfermita; en ili la alvoko pri Frateco trovas respondon, kaj ili, sekvante la vojon, alportos la resanigon de la nacioj, la librecon de l' homaro, la pacon al ĉiuj estajoj.

G. Colmore, trad. P. W. Van den Broek, Leiden.

Humoro.

Estas, eble ke en samideanaj rondoj sidas nur rondaj samideanoj. D-o Joh. Ev. Schweiker.

Pensero.

Bone estas, ke la cindrujoj en vagonoj estas renverseblaj; se ne, estus necese, renversi la tutan vagonon, se oni volus elŝuti la cindron. D-o M. T.

Rim. de la Redakcio: Nia kompostista lernanto Karlĉjo aroge permesis al si, aldoni, ke estus granda felico, ke nia gazeto ne estas renverse presita. Alle ĉiuj esperantistoj devus kaptiĝi pri legi ĝin.

Ribinsk (Jaroslava gub.). 14. 10. 25 k-do Valentinov faris esp. raportojn en urba klubo de profesiaj unuigoj. 15. 10. por poŝtofciistoj kaj 17. 10. por instruistoj. Komenciĝis kursoj.

Tver. La 25 marto en la klubejo de Ligo okazis jar-kunveno de tveraj esp-istoj. K-do Varankin faris raporton pri SEL kaj k-do Lebedev pri la agado de l' societo. Estis reelektata estraro kaj post fino de la kunveno la kunvenitoj ekiris al la radiostacio, kie ili aŭskultis esperantan radiokoncerton el Moskva. La koncerto estis bonege aŭdebla.

Vjatskoje-Danilovskoje (Jaroslava gub.) 1. 11. 25 k-do P. Tihonov faris raporton pri Esp. Komenciĝis esp. kursoj. Sovetlanda Esp. Servo.

Internacia Asocio de Esperantistoj Stenografistoj.

La 9 marto, en Centra Oficejo de Paris, okazis eksterordinara kunveno de Internacia Asocio de Esperantistoj Stenografistoj. Dum ĉi tiu oni procedis la baloton de la Konsilantaro, kiu konsistas nun el:

F-lino Bonnet, s-oj Lefebvre, Demarcy, Marchand, Flageul (Francujo), f-lino Colyn, s-o Coogen, (Belg.) s-o Omelskyj (Aŭstrio), s-o Bredall (Brit.), s-o Popov (Bulgardo), s-o Polacĉek (Ĉeĥoslovakio), s-o Leffler (Germanujo), s-o Bengough (Kanado), s-o Chrapusta (Polujo), s-o Warden (Skotl.).

Post tiu kunveno, alia okazis: tiu de l' francaj ĉeestantaj elektitoj, kiuj ricevis la sekvantajn postenojn:

S-o Lafleur, prez., s-o Marchand, ĝenerala sekr., s-o Lefebvre, kasisto, s-o Demarcy, bibliotekisto-arkivisto kaj ĉefredaktoro de „Internacia Stenografisto“.

Por kiu ajn klarigo bonvolu vin turni al la sekretario, 49, avenue de Verdun en Issy-les-Moulineaux (Seine), Francujo.

Alvoko.

Komence de februaro de tiu ĉi jaro estas fondita „Landunuigo de Aŭstria Esperantistaj Fervojistoj“. Al ĝi apartenas nun tri grupoj, nome Wien Nord, Wien West kaj St. Pöllen. Pluaj grupoj ekfundiĝas. Ĉiu aŭstria esperantista fervojisto sendu sian adreson por respondkarto al prezidanto de la landunuigo s-o Hugo Steiner, inspektoro de ŝtatifervojoj, en Bisamberg bei Wien (Aŭstrio), de kiu li ricevos ĉiujn bezonatajn informojn. Dum la XVI-a okazos ankaŭ kunveno de fervojistoj. La preparojn por tiu jam nun aranĝas la „Aŭstria Landunuigo“. Ĉiuj fervojistaj gekongresontoj bonvolu sin tuj anonci al prezidanto de la unuigo, por ke la Prepara Komitato informiĝu pri nombro de la gekolegaj partoprenantoj la kongreson.

Deziratajn informojn oni tuj ricevos skribinte per respondkarto.

Venu fervojistoj plejnombre kaj ne forgesu tuj anonci vin laŭ adreso Hugo Steiner, Bisamberg bei Wien.

Al la tabak-kontraŭuloj ĉiulandaj!

La loka grupo de la „Ligo de germanaj tabak-kontraŭuloj“ en Wien, inter kies anoj ankaŭ estas esperantistoj, intencas aranĝi fakunvenon de tabak-kontraŭuloj dum la Unuversala Kongreso de Esperanto en sama urbo kaj petas pri opinioj pri tio, resp. pri alsendo de proponoj laŭ adreso: Ligo de germanaj tabak-kontraŭuloj, al D-o Hloucha, Wien, I., Kleeblattg. 7, Aŭstrio.

Danziger-Esperanto-Gesellschaft.

Al ĉiuj esperantistaj societoj!

Por kompletigi nian sukcesan Esp. propagandon plej kore ni petas pri regula sendado senpaga de du ekzempleroj de via „Liga-Gazeto“ ĉar nia kazo ne povas elspezi apartan monon por viaj sciigoj. Diversaj esp. gazetoj jam troviĝas en la lega salono de la parlamento. Ankaŭ la biblioteko enhavas kelkajn librojn en germana kaj esperanta lingvoj pri nia movado. La dezirataj ekzempleroj estas nur destinitaj por nia ŝtata parlamento (Volkstag).

Esperante pri via subteno, ni diras plej bonan antaŭdankon.

Danziga Esperanto Asocio

Aeltermann, prez., Danzig, Töpferg. 55. I.

Estas peate, ke aliaj gazetoj esperantaj senpage represu ĉi tiun artikolon, ke gazetoj kaj eldonejoj alsendu en junio unuopajn gazet-ekzemplerojn kaj instruilojn, vortarojn ĉiuspacajn por la ekspozicio.

Propagandistoj!

Ĉiulandajn samideanojn petas amika rondo ke ili helpu al ĝi en propagando sendante al ĝi diversajn esperantajjn, il. pk. ktp.

Ni estos dankaj kaj al ĉi ni respondos kaj kelkaj de ni restos en daŭra korespondado kun samideanoj kiuj skribos al ni. Adreso: Mirko Zidariĉ, Koprivnica, Gajeva ul., Jugoslavio.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unufanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiuj novaĵoj el esp. movado. Kontdi: rapide, koncize, fidinde, legible (precipe nomoj),

Ameriko.

Usono.

La ĉefaj radio-grupoj de New York aranĝis en la granda balĉambro en la Pensylvania Hotel je la 5-8 marto ekspozicion kaj fervoraj ĉi tieaj esperantistoj penadis akiri lokon en la ekspozicio por propagandi Esperanton kiel la radio-mondlingvon. Montrante multe da libroj kaj gazetoj oni bone sukcesis kaj multaj interesiĝis pri Esperanto. La American Radio-Relay-League ŝajnas elekti Esperanton kiel „Radio-Lingvo“, ĉar ĝia taŭgeco en Eŭropo jam estas praktike pruvita per „Radio“.

La interpuŝo de la nova kaj malnova renkontas nin ĉiufanke: nacioj kontraŭbatalantaj naciojn, militoj kaj onidiroj pri militoj, fizika forto klopodantaj konservi sian superecon.

Tamen ĉi tiuj estas la doloroj ne de la morto, sed de la naskiĝo. Frateco akcelita jam de longe en la utero de tempo, devas esti naskata; kaj antaŭ dekaŭ jarcentoj la fino de ĉi tiu jarcento estas antaŭdirita de Unu, kiu sciis la signojn de ĝia fino, sciis la tagiĝon de la Frateco-jarcento, sciis, kiu venos por gvidi ĝiajn malfermatajn jarojn. Pli frue ankoraŭ la profeto Isajo vidis vizio Fratecon sur tero, ne konfuzo de ĝia komenco, sed en la beleco de plena estado: Frateco inter nacioj, Frateco inter klasoj kaj kredoj, Frateco inter bestoj, Frateco inter bestoj kaj homoj.

Sed homo devos konduki la vojon. Ne pli longe li devas konsideri sin mem aparta de aliaj klasoj de estajoj, ne pli longe pretendi por si mem la rajton uzi kaj malbonuzi la kreaĵojn de la besta mondo, kiuj pli bone konvenas al lia profito aŭ plezuro. Tiu ĉi sintenado, tiu ĉi tiraneco difektas ne nur la kreaĵojn eksploatatajn kaj vundatajn, sed homon mem: ili formas en ĉi tiu periodo de lia evoluo barilojn en la vojejo de lia progreso, tedante lian percepcion kaj malhelpante lian kreskon: li ne povas rekte antaŭeniri, ĝis la homaro, antaŭ la bestoj kaj birdoj ĉasantaj, ĉesu la buĉadon; tio signifas, ke la homaro, elkreskanta el sia primitiva impulso, finu difekti la sendefendulojn, ĉesu embarasi la malfortulojn;

Membroj en pli ol 40 landoj

Unua klubo por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtkartojn ilustr., papermonon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Poŝtilu prespektion kontraŭ respond-kuponno de s-o

Fr. Jakobi, Balnhofstrasse 29, Coblenz - Germanujo

Forster 1 1/2 Ĉ. P. Motorbiciklo
 Garantio: 12 monatoj :: :: :: Modelo 1924



1 cilindro, 2-fakta, 140 kubcm, 2 transmisiiloj, liberado, kupligo kaj oportuna rimeno-streĉado, vetur-rapideco 10-60 km po hore, suprenirprovo ĝis 20%, Esenc-konsumo ĉirkaŭ 1 litro da benzino kaj 1/2 oleo po 50 km.
 Tuj liverbla el provizilo.

Prospektaj (germane kaj france) kaj informoj senpage haveblaj de
Gebr. Forster, fabriko de Motorbicikloj
 Hinwil (Zürich), Svislando

Seriozaj pagokapablaj reprezentantoj serĉataj en ĉi tuta mondo

ĈU VI

interesigas pri la celoj de la Libera Katolika Eklezio?
 Se jes, atentu la flugfolion hodiaŭ sendata al ĉiuj abonantoj de ET.

Informojndonas
P. W. v. d. Broek
 Kargerswaat 8
 Leiden
 (Nederlando).

Se vi bezonas Esperantajojn

postulu la riĉenhavan katalogon de
 :: niaj multe ŝatataj eldonaĵoj! ::

(Lerno- kaj ekzerco-libroj, vortaroj, literaturaj verkoj ĉiusepacaj, insignoj, propagandiloj ktp.)

Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!
 La plej malnova el ĉiuj ekz. Esp.-gazetoj.
 Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m. b.H.
 Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanujo)

Hipoteko de 1000-3000
 germ. or-mk.

urĝe serĉata

je unufamilia vilaĝa vilaeto apud Leipzig. Senŝulda. Antaŭmilita aĉetosumo 15000 germ or-mk. Registriro en alia bona valuto. Altaj interezoj! Fidinda kaj sekura afero. - Petu detalojn de l' posed-anto

D-o Walter Döhler, Riesa (Germani.).

Saĝaj sinjorinoj!

Atentu, se vi uzas rimedojn kontraŭ malhelpoj en la menstruacio! — Estu singardaj pro ofertoj, kiuj nur malofte plenumas tion, kion ili promesas!

Savon kaj novan vivigojon alportas mial de ĵardokoj provitaj special-rimedioj. Ili forigas malsanemajn ekhalojn, kiuj povas puŝi vin al malsaneco. — Ili ankaŭ helpas en malfacilaj statoj. Plej simpla uzo, garantiite sen malfluo. Neolu malhelpoj al laboro. Multaj libervoloj kaj koraj dankleteroj pravas la sukceson, konstateblan ofte jam post nur kelkaj horoj. Sendado diskrete per remburso. Ĉu vi suferas? Se jes, skribu ankoraŭ hodiaŭ al

Higiena entrepreno: W. Heilmann, Bellealliancestr. 46, Hamburg 19/947.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage.

Aliaj anoncetoj, nur akceptataj pro minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (ĉiujn pri adreso) la prezon de ek ET-numerol kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas propraĵan anoncetot preferan prezon de kvin ET-numerol. Germanoj pagas 2—mk., prefere prezo por postabonantoj 1,25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

ADRES-ŜANĜO. S-ano L. Sulpovar ŝanĝas la adreson. Pri nova adreso li aparte anoncos en ET.

LA PROPAGANDA KOMISIONO de la Akademia Esperantista Rondo en Warszawa, Eoluo, scigas, ke en monato majo k. j. okazos ĉe ĝi grandioza lertvespero. Ni petas ĉiujn samideanojn kaj esperantajn organizacianojn de la tuta mondo, ke ili bonvolu skribi al ni pri diversaj temoj por nia vespero ĝis plej malfrue la 1 majo k. j. Nia adreso: Strzecha, Akademia Esp-ista Rondo, str. Nowy-Swiat 21, Warszawa, Polujo.

ZAMENHOF-BUSTO. 54 cm alta, bronz-, ebur- aŭ vaskolora, belega ornamo por ĉiuj esperantista kaj grupa hejmo. Prezo 6.50 or-mk aŭ egalvaloro. Menu: ĉe: M. Ehrentauf, Erfurt, Oststr. 1., Germanujo, Poŝteka konto 25945 Erfurt.

FLINKCIOJN de korespondanto de eksterlandaj gazetoj povas plenumi studento de Varsovia Universitato. Bonvolu skribi al N. P. Maskilejson, Nowolipi 18, Warszawa, Polujo.

ESPERANTAJ NOMOJ. Geedzoj Liudas kaj Marie Alseika el Biržai, Litovio, en majo atendas naskiĝanton idon. Ĉiujn afablinjn gesamideanojn, kiuj scias belajn esperantajn nomojn, oni petas sciigi laŭ supra adreso. Kun antaŭdanko ĉiuj ricevos respondon, kaj kies proponita nomo estos elektita, tiun ili intencas atable inviti por ilia idon esti atestanto-projektanto (baptopatro).

EN KIU ESPERANTISTA FAMILIO juna germanino povos pasigi kelkajn semajnojn en printempo (kiel paganta gastoj) por refreŝigi la nervojn, malfortigitajn de la profesia laboro kaj malbona nutrado dum la lastaj jaroj? Skribaĵojn kun prezo bonvolu direkti al F-lino Anna Hempel, Waldstr. 8, Cöpenick b. Berlin, Germ.

LA ESPERANTISTA KLUBO DE AMAL, Svedujo, aranĝas poŝtark- kaj lertvesperon la 20 aprilo. Ĉiujn skribaĵojn ni respondos. Adresu al Reinhold Larsson, Kyrgogat 115, Amal, Svedujo. (Signu la skribaĵojn L.V.)

KIU POVAS havigi al mi la unuan numeron de „Literatura Mondo“ (oktobro 1922), kaj „La Revuo“ n-ojn 87—94, bonvolu fari proponojn al mi. Fr. Schoofs, direktoro de „Belga Esperantisto“, Kl. Hondstraat 11. Antwerpen, Belgio.

21-jara KOMERCISTO kun 11-jara praktiko, serĉas postenon en Germanujo aŭ eksterlande. Mi konas Esperanton, anglan, francan kaj hispanan lingvojn, krome librotendon, korespondadon kaj maŝinkonstradon. Ofertojn al Peter Andresen, Flensburg, Katharinenstr. 7, Germ.

AL LA MARO! Du junaj esperantistoj 25-jaraj, arĥitektoj kaj komercistoj, deziregas pasigi la someran liberecmon de 8 tagoj ĉe gastemaj gesamideanoj en beleta loko apud la maro indiferece en kiu eŭropa lando. Event. ili rekompence gastigus 2 esperantistojn en bela nordbohema urbo kun interesa montara ĉirkaŭaĵo. Proponoj estas petataj al s-o F. Michalck, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥosl.

ATENTU! SAMIDEANO! Kredit-kuponoj por afrankita liveraĵo kontraŭ sendo de la anonco kaj antaŭa pago. Tiel juĝas mial konsumantoj: S-ino E. Schm. skribas laŭvorte: Via specimeno liberigis mialn parencojn kaj min de la plej grandaj zorgoj de ĉi taga vivo. Mi fartas bone kaj felice kaj povas uzi la grandajn elspezojn por la familio; koran dankon. Precipe la virino devus interesiĝi pri ĝi; sed bedaŭrinde ĝi estas konata tro malmulte. Mi bedaŭras ĉiun, kiu ankoraŭ ne trovis vian adreson. Por konatoj bonvolu sendi ankoraŭ 5 ekz. S-o D-o E. B. Ŝujas. Mi atentigas al la kvalito de viaj Desinfektaj Tablotoj en ĉiuj al mi konataj kaj konvenaj kazoj. S-o kapitano K. skribas: Mi povas certigi vin, ke viaj Desinf. Tab. en preskaŭ 5-jara uzado tute plenumis ĉiujn pretendojn. Mi posedas pli multe ol mil dankskribaĵojn! Ĉiu pensanta familio postulu tiujn specimenojn kontraŭ 5 s. fk. (Germanujo 2 or-mk.) aŭ detalan esp. prospekton kontraŭ unu resp.-kup. Kiu provos, iu laŭdus! Adreso: Otto Hierer, Nürnberg, Bavarujo, Schleifweg 55, poŝteka-konto 15255.

Korespondado kaj Interŝanĝo.

Por propagandi la lingvon! Entuziasmoj ĉie estas petataj sendi il PK kaj L al s-o B. Whalley Sidwell, Rio Hondo, Texas, Usono. Mi konsciencie provos respondi al ĉiuj.

S-o Frans Quist, Folkhögskolan, Prästmon, Sved., deziras korespondi kun gesamideanoj en aliaj landoj en tuta mondo. Aĝo 24 jaroj. Korespondas ankaŭ en germana kaj angla lingvoj per kario kaj L. Ricevos plej volonte librojn kaj gazetojn kaj kontraŭdonojn svedajn.

Du mackoj, Otto Winkelmayer, Cluj, Str. Macelarie n-o. 5 kaj D-o Francisco Köhll, farmaciisto, Cluj, Str. Eminescu 1, Rumanujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo.

Samprofesiaj! Ni rusaj studentoj de Elektroteknika Instituto de Ligilo deziras korespondi kun s-oj de la tuta mondo diverse. Adreso: k-do Lenenko, Goro ovskaja 16, Instituto Svazi, Moskva, Rusujo. Akuratan respondon mi garantias.

S-o Miloslav Nemeč, Palckého 40, Kyjov na Moravě, Ĉeĥosllovakio, bankoficisto, deziras interŝanĝi il PK kun ĉiuj landoj kaj korespondadi kun seriozaj gesamideanoj el okcidentaj kaj orientaj — precipe ekstreŭropaj — ŝtatoj. Interŝanĝas ankaŭ esperantajn, naciajn kaj il gazetojn kaj PM.

S-o Janis Milbergs, Dzelzscela iela n-o. 1, Aluksne, Latvio, deziras interŝanĝi PM kun ĉiuj landoj. NE deziras ordinarnajn germanajn PM. Ne sendas unue, sed ĉiam respondos.

Amase, pofolie po 100 pecoj) mi fordonas ĉiujn german-republikajn PM vende aŭ interŝanĝe kontraŭ alilandaj PM, prefere de Sovetrusujo. H. Remers, Luisenstr. 97, Düsseldorf, Germanujo.

S-o Atanas Zakov, selo Sadovec-Lukovitskoj, Bulgarujo, deziras korespondi per il PK kun gesamideanoj tutmondaj. Ĉiam respondos.

120 diversaj PM de Polujo kun rekomendita alsendo nur s. fk. 2.— Skribu tuj al eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Polujo. Postulu ankaŭ prezaron de esp. libroj. Seriozaj PM-interrilatoj serĉataj.

Tri fratoj Richard Tautz, 25-jara, Alfred Tautz, 21-jara kaj Erich Tautz, 20-jara, deziras korespondi per il PK kaj L kun gesamideanoj de la tuta mondo. Ni respondos certe.

S-o Jakob Zavzin, 2-a rajono, Ĉeĥovskaja ul. N. 19, Dez., Astrahani, Rusujo, deziras interŝanĝi vidajkartoj, L, PM kaj gazetojn kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

S-o Paŭlo Avedjnin, volonte interŝanĝos kun seriozaj kolektantoj de PM (novaj kaj malnovaj) el ĉiuj landoj. Adreso: poste restante, Bobruisk, Minskoj gub., Rusujo.

S-o Alfred Wulpes, frizisto, Köln-Flittard, Hauptstr. 75, Germ., deziras korespondadi kun samfakanoj en la tuta mondo.

Por 100—200 ĉiulandaj PM mi sendos belan manfaritan naztukon (eventuale du laŭ valoro de PM). Mi ankaŭ interŝanĝas PM. S-o Ernst Lederer, vicdel. de UEA, Saz, 324, Ĉeĥosl.

S-o Nedelčo Stefanov, Maschinschule, Varna, Bulgarujo, korespondas per il PK kaj L pri diversaj temoj, interŝanĝas PM, il gazetojn kaj naciajn muzikaĵojn kun la tuta mondo. Tuj respondos.

Por perfektigi en esp. lingvo mi serĉas diligentajn gekorespondantojn pri unu temo el tuta mondo. F-lino Wally Steuer, Masaryková ul., Orlovač, Ĉeĥosllovakio, Silezio, Ĵ.

Al mial gekorespondantoj mi scigas, ke mi haltos la korespondadon en junio pro foriro Nederlandon. Kiu eble poste deziras daŭrigi, skribu laŭ mia tiama adreso: J. T. Kaptein, Westgracht, Helder, Nederlando.

S-o Deziderio Racsmány, Budapest, Czobor u. 124, 7, Hung., deziras interŝanĝi PM. Ne sendas unue, sed nepre kaj honeste al ĉiu respondos.

Filatelistoj atentu! Mi vendas 4 PM el Suahelo (Zanzibaro) el jaro 1896. Pro prezo oni skribu al s-o E. Höhne, instruisto, Apolda, Germanujo.

S-o Franz Levy, Zimmerstr. 4, Breslau 5, Germanujo, deziras korespondadi kaj interŝanĝi PM kaj gazetojn (Esperanto, sporto kaj politiko) kun la tuta mondo. Mi tuj respondos.

S-o John Van der Rieten, St. Jobstr. 26, Antwerpen, Belgio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj; interŝanĝas PM.

S-o Remi Paternoster, Staatsnormaalschool 8, Gent, Belgio, deziras interŝanĝi PM, papermonon, PK kaj portretojn.

Belga samideano deziras interŝanĝi PM. Sendu nur nedifektajn. Ne sendas unue. S-ino R. Gallis, 27 Berthouhstr., Berchem (Antwerpen), Belgio.

S-o H. Agevik, Tre Liljorsplan 5, 1 tr. h., Stockholm, Svedujo, deziras interŝanĝi il PK kun gesamideanoj de la tuta mondo.

Intencas vojaĝi al Mulhouse, Francujo, tial mi deziras korespondi kun tiaj kaj gesamideanoj tutmondaj. Nepre respondos. Rudolf Gröbning, Lankovitz 101, Sibirio, Aŭstrio.

Korespondadon per il PK kaj L kun ĉiulandaj gesamideanoj deziras s-o Karl Hachmann, Mittelweg 40, Cleve (Rhld.), Germanujo. Respondos al ĉiuj.

Mi deziras korespondi kun fraŭlinoj en aĝo de 20—40 jaroj de la tuta mondo per il PK. Adreso: s-o Michael Schubert, Sarajevo, Koševo ul. 16, Jugoslavio.

S-o A. Krome, horlogisto, Solitudestr. 68/b, Ludwigsburg (Württbg.), Germanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per L kaj il PK.

S-o N. S. Riškov-Makeev, Tojima de Vologda gub., Rusujo, korespondas kun ĉiuj landoj per il PK kaj L kun personoj, kiuj klare skribas sian adreson, korekte afrankas, sufiĉe scias la lingvon, kaj ne kolektas po unu poŝtarko de ĉiu, anoncinto; ĉiam respondos, sed ne sendas unue.

S-o Carlo Massocco, Salita S. Girolama 11—4, Genova, 6, Italujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo. Prefaras: Nederlandon, Belgion, Svislandon, Hispanujon, Portugalujon, Saarteriorion, Memel, Danzig, Rusujon, Litovion kaj Estonion.

S-o Vicente D. Benetto, Morteros (F.C.C.A.), Argentino, deziras korespondi per il PK kaj L kun ĉiulandanoj. Ĉiam respondos.

F-lino Emma Wendrick, 8 Quai des Charbonnages, Bruxelles, Belgio, deziras korespondi kun fraŭlinoj 18—20 jara en Ameriko nur en angla lingvo.

S-o F. La Gravière, 85 Rue St. Josse, Bruxelles, Belgio, deziras korespondi letere, nur en angla lingvo kun Ameriko.

Kontraŭ 10 il. karioj neuzitaj mi sendos 25 diversajn sov. PM. Ankaŭ interŝanĝas PM, krom Germanujo. Mi respondos ĉiam. Bazilio Averin, Poŝtiko 14, Astrahani, Rusujo.

S-o Viktor Bonde, Stenslund 2, Falun, Svedujo, deziras gekorespondantojn por siaj en komenco de aprilo finigitaj kursoj.

S-o Einar Adamson, redaktoro, Sveda Laborista Asocio, Göteborg 1, Svedujo, deziras korespondantojn por si mem kaj siaj lernantoj. Interŝanĝas il PK kaj L, ankaŭ gazetojn, papermonojn kaj PM.

S-o Max Petzold, Netzsckau l. Vogtl. (Germ.), Bahnhofstr. 7, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj per il PK kaj L. Ĉiam respondos.

S-o Karl Beer, Grenzstr. 16, Nürnberg, Germanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj, precipe eksterlandanoj per il PK kaj L.

50 gelnantoj deziras korespondi kun la tuta mondo per L kaj PK. Adreso: Esperanto, Ecole Pigier, Place de la Banque, Perpignan, Francujo.

Instruisto Richard Themel en Kriesdorf apud Reichenberg, Ĉeĥosllovakio, deziras korespondi per L kaj il PK kun gesamideanoj de la tuta mondo, escepte Ĉeĥosllovakio. Germanujo kaj Aŭstrio.

Kun ŝpĵnestro deziras korespondi pri temoj de ŝpĵnado ktp. Heinrich Hauser, stud. text., Textilschule en Reichenberg, Ĉeĥosl.

S-oj Venzel Jäckel, Zastera kaj Ernst Rudolf en Kriesdorf ATE, Ĉeĥosllovakio, deziras korespondi kun gesamideanoj tutmondaj (escepte Aŭstrio, Germanujo, Ĉeĥosllovakio) per il PK kaj L. Nepre respondos.

S-o Andrianasolo J. Laurent, instruisto, P. C. N. Ambohivanoro (Tananarivo), Madagaskaro, Afriko, deziras korespondi kun seriozaj samideanoj, prefere italoj pri muziko. Kolektas muziknotojn tutmondajn. L.P.L.I. Ankaŭ akceptos volonte franglingvajn propagandilojn por verbardo.

S-o Daniel Rasolo, lernanto de P. C. N. ĉe s-o A'solo J. Laurent, Ambohihanoro (Tananarivo) Madagaskaro, deziras korespondi kun samideanoj de tuta mondo por perfektigi. Nur serioza korespondado per L kaj PK il.